Julianna Vas–Szegedi,

# Vekiĝo

La vojoj estas
neĝkovritaj, la domoj,
krudgrizaj homoj
malvarmume sin vestas.

La vintro urĝas,
strebas transvivi, do, ne,
tamen, ho, mole
ĝia forto disfluas.

Vuale venas
laŭorde de l' naturo
stranga futuro,
palan esperon tenas.

La sun' timeme
kuraĝiĝas kun nuboj,
lacaj fumtuboj
spiregas frostotreme.

Perdita sento.
Kreskaĵeto klopodas,
finte ridetas
al la rigida vento.

Suno elfore
vidiĝas tra nebuloj,
grizaj okuloj
time rigardas fore.

Postlasi nome
paseon kaj ekspiri!
Emfaze iri
ne mute kaj pli home!

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Julianna Vas–Szegedi, publikigita 2004-02.*

*Arg-309-626 (2005-05-04 10:01:00)*